


# **E**starto

**ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



**PF 81**  
AL NIAJ  
LEGANTOJ  
DEZIRAS  
LA REDAKCIO

1980·6·(82)



## HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jero vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas : la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ  
- oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -

KARLOVY VARY  
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ  
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ  
JÁCHYMOV  
TEPLICE V ČECHÁCH  
PODĚBRADY  
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ  
JESENÍK - LUHAČOVICE  
TEPLICE NAD BEČVOU

o o o o o o o o o o o o

### BALNEA

Reprezentanto  
de ĉeĥoslovakaj  
banlokoj  
kaj kurac-fontoj,  
Pařížské tříde 11,  
110 01 PRAHA 1

ĈEROSLOVAKIO

Tx: 122 215



# REMEMOROJ PRI VERDA STACIO

Ĉeĥoslovaka radiostacio en Brno envicigis en la jaro 1931 en sian programon ankaŭ kurson de Esperanto, kiu ekhavis tiom da favorantoj kaj adeptoj, ke la programgvidantoj plenumis la deziron de esper. kluboj, envicigis mallongajn raportojn kaj dum noktaj horoj ankaŭ specialajn programojn plejparte de artisma karaktero.

Granda subtenanto de tiu ĉi ago estis legenda direktoro de la radiostacio en Brno ing. Antonín Slavík, kiu ŝargis Dalibor Chalupa, estron de literatura fako zorgi pri esper. programoj. Sed la kunlaboro de ĉiuj ceteraj kun li estis pli ol oferema. Ili nome ekkonis kaj spertis agforton kaj eblecojn de la lingvo, kiu facile povis largigi sciojn pri nia lando kaj nia kulturo en ĉiuj europaj ŝtatoj.

En Brno estis pluraj bonaj esperantistoj, kiuj kapablis elsendi raportojn aŭ legi prelegojn; ili tamen ne estis spertaj por versrecitado aŭ por dramaj elsendoj. Tiel naskiĝis la unua aktora grupo, pli poste konata sub la nomo TRAKT, en kiun aliĝis membroj de ŝtata teatro en Brno, kiuj frekventis la kurson. Ĝi ne celis lernigi ilin konversacii, sed precizan prononcon; tiu ĉi tasko transprenis la regisoro Josef Bezdiček, kiu ankaŭ ĝuste pritaksis kion povas esper. elsendado signifi por Ĉeĥoslovakio. La aktoroj laboris tre konscie; sufiĉas nomi almenaŭ Karel Höger, kiu akiris famon de la plej bona esper. aktoro en la mondo. Tial Brno estis respektata de esperantistoj ĉie en Eŭropo kaj la stacio estis honore titolata Verda stacio.

Oni elsendis instruajn prelegojn, raportojojn, muzikprogramojn, literaturajn scenmuntadojn. Favorene venadis tiom da leteroj, ke ne eblis ilin individue respondi; tenis pri mi loj. La programoj estis proksimume unuhoraj, programitaj unufoje monate krom aŭgusto kaj septembro.

El la plej interesaj estis:

Weinberger-Peláček-Žalman: Sur rozoj sternite /opereto/

Bedřich Smetana : opero Vendita fianĉino

Radiofilmo "Vagado en Ĉeĥoslovakio /pri ĉeĥosl. banejoj kaj somerlekoj/

Karel Čapek : R U R / adaptita teatraĵo/

Kareš - Křižka : Ĉeĥa Betlehemo /ludo ĉun kantoj/

En la ciklo "Ĉeĥoslovakio laborante" aŭskultantoj estis informitaj pri nia arto, kulturo, industrio kaj ceteraj laborfakoj.

Kun proksimiĝanta tempo, kiam la sekureco de Ĉeĥoslovakio estis dengerigita de najbara naziismo, multiĝis radiomuntadoj alarmantaj nian atenton kaj de ekstere intereson pri nia lando; en tiun sferon apartenis ekz. "Blanka malsano" de Karel Čapek kaj similej programoj. La pretaco de ĉeĥoslovaka radio estis en mi loj da leteroj tre laude komentita; la plej multaj aprobaĵ leteroj venadis el Francujo, Svedujo, Britujo, Hispanujo, Jugoslavio, sed ankaŭ el Germanujo. La programojn ie aŭskultadis komune tutaj grupoj. Por ĉies informado ni devis komenci la eldonadon de "Ĉeĥoslovaka Radio - bulteno". Multaj altlernejoj profesoroj, konstantaj aŭskultantoj, estis kun la Radio Brno en ĉaura kontakto /el Grenoble, Valencia, Barcelona, Beograd, Roma k.t.p./.



\* La aktoroj kaj kantistoj, funkciantaj en esper-programoj, estis invitataj publike aktori en fremdaj urboj. La Stacio estigis honora membro de Esper. radioklubo en Francujo. Survoje al Francujo mi mem travivis specialan aventuron. Ekaŭdinte la voĉon de mia edzino, aktorino Zdenka Švabíková, kiu ludadis ĉefrolajn, la deganestro laŭ la voĉo ŝin ekkonis, ĉesis la kontrolon, sidigis ĉe ni kaj tiutage la kontrolo finis, tian ĝojon provokis ambaŭflanke la persona kontaktiĝo.

La okupacio interrompis tiun aktivadon en Brno, sed post la jaro 1945 Prago ĝin daurigis. Tien transiris D. Chalupa, J. Bezdiček, ankaŭ K. Höger. Kvankam la sendstacion levangis novaj devoj, tamen oni sukcesis envicigi multajn valorajn programojn ekz. ankaŭ la operojn Najado kaj En la puto aŭ surscenigon de Maja fabelo de V. Mrštík. La elsendado daŭris ĝis 1948.

Mi supozas, ke Verda stacio estiĝis por nia movado nocio tre altgrava kaj esperantistoj en multaj landoj ĝin nostalgie rememoras.

František K o ž í k



— František Kožík —  
— la jaro 1947 —



Čoulová Marie  
— la jaro 1947 —



Křiváňová Lída



Kulháňová Jarmila



Lámbíková Jarmila



Nováková Anička



Štěrbová Věra  
— la jaro 1947 —



Štefcová Věra



Švabíková Zdenka



Tola Zdeňka



Zuzka Vlasta



Fala Antonín



Heger Karel



Jedouš Vladimír



Klimeš Antonín



Kroupka Václav



Kolář František Duš



Kuvanda František



Lereus Václav



Loukota Jindřich



Mál Karel



Mlýnský Karel



Václav Simek



Štepl František



Valík Josef

# Ĉeĥa Esperanto-Asocio

## Porpaca Sekcio

### Metodika-propaganda komisiono

anoncas por la tuta jaro 1981  
okaze de la 60 - jara jubileo de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio  
kaj ĝia XVI-a kongreso

#### KONKURSON "AMIKECO 1981"

La enhavon de la konkurso esprimas la ideo :

"Kiel ni popularigas niajn amikajn rilatojn"

Signifo de la amikaj rilatoj por fortigo de la tutmonda paco estas senduba. En nia lando tiuj ĉi rilatoj fariĝis longjara tradicio. Ĉiuj niaj regionoj, distriktoj, urboj kaj ankaŭ multaj politikaj kaj civitanaj organizaĵoj gemeliĝas kun similaj institucioj en USSR kaj aliaj socialismaj landoj. Sed nesufiĉe estas popularigataj la rilatoj surbaze de la Internacia lingvo. Necesas emfazi signifon kaj utilon de la reciproka interkomprenigo por realigado de la amikaj rilatoj. Kaj tio estas la plej interna kaj same la plej grava senco de nia nova konkurso por ĉiuj lokaj grupoj de ĈEA: popularigi rolon de la Internacia lingvo por amikaj rilatoj de niaj socialismaj Esperanto-organizaĵoj.

#### Regularo:

##### I-a kategorio: Ekspoziciado de la dokumentoj:

Ĉiu loka grupo publike ekspoziciu - almenaŭ unufoje dum la jaro 1981 - suvenirojn kaj donacojn ricevitajn el sia ĝemela organizaĵo - kaj aliajn dokumentojn: fotografaĵojn, albumojn, kronikojn, salutleterojn ktp. Fotografu vian ekspozicion en plena vido, kaj se eblas ankaŭ kelkdetale. Aldonu mallongan artikolon pri tio, kiel vi realigas viajn amikajn rilatojn kaj kiamaniere vi popularigas ilin /en lokaj gazetoj aŭ oultenoj/. Se eblas, aldonu ankaŭ iun dokumenton pri la popularigado: eltranĉaĵon kun originala titolo de la loka gazeto.

##### II-a kategorio: Kongresa ekspozicio:

Dum la IV-a Kongreso de ĈEA en la unus kvaronjaro de 1982 estas konstruata la tutstata ekspozicio "AMIKECO '81". Por tiu ĉi ekspozicio preparu tri interesajn eksponaĵojn - dokumentojn pri amikaj rilatoj de via loka grupo kun simila grupo en socialisma lando. Preparu ankaŭ la plej interesan paĝon /liston/ el via kroniko, dokumentanta viajn amikajn rilatojn; interesajn leterojn, albumojn ktp.

#### Manieroj de la pritaksado:

Por la I-a kategorio validas kutimaj reguloj por la pritaksado de la vitrinoj kaj elmontraĵ fenestroj:

- |   |     |            |
|---|-----|------------|
| 1/ ideo-politika direktigo .....                  | 25  | poentoj    |
| 2/ esprimo de la kunligo kun Esperanto-celoj .... | 25  | poentoj    |
| 3/ grafika arango .....                           | 25  | poentoj    |
| 4/ pureco de arango .....                         | 25  | poentoj    |
| Sume eblas ricevi: .....                          | 100 | poentoj/n/ |

Bluzu prefere vitrinojn kaj elmontraĵn fenestrojn, ĉar tiuj kestoj estas tro malgrandaj por tiu ĉi celo!

Por la II-a kategorio: Ĉiu delegito kaj gasto de la IV-a Kongreso de ĈEA ricevos balot-kuponon. Tie ili anonime pritaksos siaopinie la plej bonan ekspozicion, nome ties lokan grupon. T r i grupoj kun laŭvica plimulto da voĉoj ricevos premiojn.

P r e m i o j /en ambeŭ kategorioj/:

1-a premio ..... Kĉs 300,-  
2-a premio ..... Kĉs 200,-  
3-a premio ..... Kĉs 100,-

L i m d a t o j k a j a d r e s o j :

I-a kategorio: La dokumentojn /fotografajojn de la loka ekspozicio kaj artikoletojn pri realigo de viaj amik-rilatoj/ sendu gis la

31-a de decembro 1981

al gvidanto de la metodika-propaganda komisiono de ĈEA:

Karoslav Klement, kpt.Nálepky 7, 360 04 Karlovy Vary

II-a kategorio: La eksponaĵojn por la kongresa ekspozicio sendu en bone pakita bokso /markita per legebla nomo kaj loko de la loka grupo/ s o l e dum monato januaro 1982, nome:

1-a - 31-a de januaro 1982

al Sekretariejo de ĈEA, Jilská 10, 110 00 Praha 1.

Bonvolu ne sendi ilin pli frue, ĉar niaj lok-eblecoj estas ege limigitaj!

La ĵ u r i o konsistos el la membroj de la porpaca sekcio de ĈEA kaj de la metodika-propaganda komisiono de ĈEA. Nomoj de la ĵurianoj estos publikigitaj gis fino de la jaro 1980. Rezultojn de la konkurso publikigos STARO N-ro 2/1982.

La konkurso komencas tuj post la Novjaro 1981. Partoprenu vaste por montri al nia publiko utilon de la Internacia lingvo, utilon de unika uzata planlingvo, utilon de Esperanto!

## VERDA ESTAS NIA FLAGO

"Oni akceptas kiel universalan esperantan flagon, la flagon de la Boulogne'a Grupo /verda tuko/ longa je 1,20 metro, kun maldekstra supra angulo blanka /0,50 x 0,50/ kaj sur tiu ĉi blankaĵo, verda stelo." Tiel oni rezoluciis en Bulonjo 1905 08 09, dum la Unua Universala Kongreso de Esperanto. Oni komprenas tiun rezolucion oficialigo ne nur de flago, sed ankaŭ de insigno esperantista /verda stelo/, kelkaj ec de "koloro de Esperanto" /verda/. Oni uzas ilin kaj por la lingvo, kaj por la movado.

Ilian antaŭhistorion publikigis Wiesenfeld 1933. La oficiala protokolo de la Bulonja Kongreso enhavas nur la rezolucion mem. Sed pri la kongresaj debatoj ni konas ankaŭ pliajn detalojn, dank' al Friedrich Schneeberger, pioniro de la Esperanta stenografio, kiu feris kaj publikigis detalajn notojn pri la Bulonja Kongreso. Sub la prezido de Emile Boirac, dum la kvara ĝenerala kunsido okazis la jenaj:



"D-ro Hanauer-Germano: Mi vidis la verdan stelon jam en diversaj manieroj kaj mi volas demandi, ĉu la kongreso ne devas fiksi la definitivan formon de nia signo?"

Prezidanto: Oni ankaŭ proponis al mi, ĉu la Esperantistoj ne devus havi propran Esperantan flagon: blankan flagon kun verda stelo?

/Inter aplaŭdego de la tuta kongreso D-ro Ostrovski-Ruso montras kaj ŝvingas la Esperantistan flagon de la grupo de Bulonjo-sur-Maro, kiu ornamas la kongresan ĉambregon./

Prezidanto: Via aplaŭdado montras al mi, ke vi konsentas, ke de nun tiu ĉi flago estu la oficiala flago de la Esperantistoj."

De, kontraŭe al la konata Deklaracio pri Esperantismo kaj la rezolucioj de la aliaj kongresoj, tiun rezolucion pri la flago oni improviziis, t.e. oni rezoluciis senprezare kaj senkonsidere. Kvankam la tradicio uzi la rezolucie fiksitajn flagojn estas forta, la malemo tion fari estas same forta. De 1905 ree kaj ree oni povas legi en la movada gazetaro plendojn de fervoruloj, ke dum tiu kaj tiu esperantista aranĝaĵo oni forgesis pri la flago, aŭ "flirtis nur unu".

La unua venko de la formiganta opozicio de la flago okazis en 1956: Fundamenta principaro de informado pri la Internacia lingvo avertis pri danĝero de tro multe da steloj kaj flagoj, kiuj donas al la movado sektecan karakteron kaj kompromitas la movadon. Kaj tiun principaron kongresa rezolucio en Ateno 1976 08 07 deklaris aktuala ĝis hodiaŭ.

Poste kolorpsikologiaj esploroj pravigis la opozicion: evidentigis, ke niaj flago kaj stelo estas absolute maltaŭgaj por propagandaj celoj. La multaj kolor-prefer-esploroj /el kiuj la plej detalan faris la Budapeŝta Teknika Universitato en 1964-1974/ pruvis, ke elekto de verda koloro estas preskaŭ la plej malfeliĉa. Oranga, ruĝa kaj blua estas la plej preferataj koloroj en ĉiu aĝo kaj sekso /krom uloj kun difektita menso/.

Fine surbaze de la sciencaj esplorrezultoj, reklamfakulo prezentis la damaĝojn de la verda koloro ĝenerale, kaj de la verda stelo speciale. Sed por propagandaj celoj eĉ preferata koloro ne taŭgas: ĉio devas esti bunta, kiel la vivo. En bone elektitaj kombinaĵoj kompreneble jam ankaŭ la verda povas roli.

Niaj tradiciaj flago kaj stelo do, estu uzataj nur en niaj internaj rondo, tre limigite kaj modeste. Atingi tion ne ĉiam estas facile, ĉar ni devas kontraŭstari ne nur al la "verdaĵ dogmismoj", sed ankaŭ al tiuj, kiuj iumomente konsternigante pri la damaĝoj, ekpostulas tujan enkondukon de la taŭga, bone uzbla flago, inda je nia movado. Nia tasko estas: konsciigi pri la verda flago. Precipe tiujn, kiuj bonintence damaĝas, ne perceptante la diferencegon inter relikvo el la pioniraj tempoj kaj propagandilo de nia epoko.

El Hungara vivo 1980, XX/3, 88

D-ro Árpád Rátkai



# internacia panoramo

RADIO POLONIA OC-950 VARSOVIO, poŝtkesto 46 Pollando:  
10-tagajn estadojn en Pollando, valorajn objektajn premiojn povas lotumi eksterlandaj geaŝkuptantoj, kiuj respondos jenajn demandojn:

- 1/ Kiom da Internaciaj Chopin-Konkursoj okazis ĝis nun en Varsovio?
- 2/ Kiujn venkintojn de tiuj ĉi Konkursoj vi konas?
- 3/ Ĉu niaj muzikaj elsendaĵoj pliproksimigis al vi la verkeron de la polaj komponistoj? Kiuspecan muzikon vi deziras aŭskulti en la programoj de Radio Polonia?
- 4/ El kiu verko de Frederiko Chopin estas ĉerpita la signalo de Radio Polonia?

Respondo almenaŭ al du demandoj rajtigas al partopreno en la lotado de la ĉefaj premioj.

La templimo por la elsendado de la konkurs-respondoj pasos la 31-an de decembro 1980. Decidas la dato de la poŝta stampo.

La rezultojn de la konkurso ni anoncos en ĉiuj niaj disaŭdiĝoj la 31-an de januaro 1981.

La ekskurso de la ĉeflaureatoj okazos en periodo, indikita de Radio Polonia.

- - - - -

Ankoraŭ pri la 65-a Universala Kongreso en Stokholmo: Laŭ la informo de sveda poŝtadministracio esperantistaj partoprenintoj forsendis dum la Kongreso entute pli ol 20 000 poŝtaĵojn /21 778/ kun kongresa stampo. La poŝto pritraktas tion kiel nekutime bona rezulto.

- - - - -

BRAZILO - RAVA TROPIKA PARADIZO, okpaĝa vere luksa, multkolora faldprospekto, kiun eldonis ministerio pri industrio kaj komerco-Embratur, Rio de Janeiro. En perfekte lingvo oni ricevas bildon kaj imagon pri ĉefaj trajtoj de la kongreslando 1981. Enmetita Unua bulteno kaj Aligilo.

- - - - -

UNESKO. En la n-roj 16/79 kaj 18/80 la lingvistika bulteno "AL-SED" aperigis aktualajn informojn pri Esperanto, i.a. bibliografion /de H.Tonkin/, lanĉigon de faka revuo kaj eldonon de 5 "Esperanto-Dokumentoj".

- - - - -

PERUA TELEVIDO. Post la programo elsendita en Lima, kie parolis pluraj enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj, proks. 100 personoj decidis eklerni Esperanton.

- - - - -

HELPO AL ESPERANTISTOJ EN SOVETUNIO. La centra konsilio de la sovetaj profesiaj unuigoj konsentis helpi la organizaĵojn de sovetaj esperantistoj. La decido antaŭvidas helpon al lokaj E-rondoj koncerne ejojn por lernado, trovon de spertaj instruistoj, renkontiĝojn kaj seminariojn.

MATEMATIKA TERMINARO en Esperanto kaj en 11 ceteraj lingvoj aperis zorge de la Europa Klubo en Paderborn /FRG/.

Okaze de la III-a KONFERENCO DE ESPERANTISTOJ EN KULTURLIGO de GDR, okazonta fine de majo 1981 en Karl-Marx-Stadt, bv. sendi salutojn /bildkartojn au leterojn/ al Kulturligo de GDR, Distrikta Laborrondo, Esperanto, DDR-90 Karl-Marx-Stadt, Dr. Otto Nuschke-Str. 6.

ESP. FILATELO. Afiŝoj, inter kies 9 emblemoj estis ankaŭ la Esperanta, invitis al Nacia ekspozicio de laŭtema filatelo en Praha /ZK Kotva 25.10. - 2.11./ . Tri partoj de la ekspozicio rilatis al Esperanto kaj IL generale. Pri ilia valoro atestas la atribuitaj medaloj: Vladimír Váňa ricevis orumitan, Dolfa Bartošik argentan kaj s-ano Hadámek argentumitan. D. Bartošik estis invitita al Monda filatela ekspozicio VIDA, Vieno, en majo 1981. - La temo Esperanto havas jam firman kaj rekonatan pozicion ĉe la filatelistaj instancoj. /J.M./

HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO preparas por la venonta jaro eldonon de ĉiuj poeziaj tradukoj de K. Kalocsay en unu granda 600-paga volumo, sub titolo "Tutmonda Sonoro." La verko enhavos ĉ. 400 poemojn de 140 poetoj el 30 lingvoj.

En Brazilo aperos ĉefverko de la portugala literaturo "LUZIDOJ" de L. Camoens.

En libro-serio "Oriento - Okcidento" aperos tre baldaŭ "SONETOJ" de W. Shakespeare en traduko de W. Auld.

RIGARDO AL NORVEGUJO - belega faldprospekto, kiu elĉerpas ĉiujn sciindaĵojn pri la lando, ĵus aperis. 20 plurkoloraj fotobildoj kun 10-paga informa teksto /plene senerara/. Eldonis Reĝa Ministerio de Eksteraj Aferoj por senpaga distribuo eksterlande. Redaktis: Erling Welle-Strand. Mendo: Norvega Esper. Ligo, Boks 942 OSLO 1, Norvegujo.

## ni recenzas

Nguyễn Trãi. Unu el la plej belaj figuroj de la vjetnamaj historio kaj literaturo. Publikigita okaze de la 600-a naskigdatreveno de Nguyễn Trãi ĉe Ruga Rivero - Fremdlingva Eldonejo Hanojo 1980. Paĝoj 99, formato 13 x 19 cm, broŝurita, prezo ne indikita.

La libreto prezentas al ni elstaran personecon de la vjetnama historio, kiu vivis en la j. 1380 - 1442. Li fariĝis amata heroo de la vjetnama multsuferinta popolo. Ni ekkonas lin ne nur kiel patriotan literaturiston kaj poeton, sed same kiel brillan strategiiston kaj talentan diplomaton, milit-

estron kun forta sento de humaneco kaj justeco.

Igante gvidanto de la vjetnama popolo en ties batalo kontraŭ la ĉinan agreson far la dinastio Ming, li gvidis ĝin al venkoj super la ĉina pliforto. Li batalis same lerte per armiloj kaj militarto kiel per vortoj, kiujn li direktadis en leteroj al la komandantoj de la ĉinaj armeoj, ĝis la fina venko kaj liberigo el la 20-jara ĉina jugo. Legante pri la entuziasmo kaj braveco de la vjetnamaj batalantoj, kiujn fortigadis la konscio pri vereco de ilia kredo: "tiu, kiun animas la justeco povas kontraŭstarigi etan nombron al pli granda nombro", oni ekpensas pri niaj husanaj batalantoj kaj venkoj okazintaj en la samaj jardekoj. En Nguyen Trai kvazaŭ unuigas nia magistro Jan Hus kaj armeestro Jan Žižka. Nur kun diferenco, ke tie luktadis centmilaj armeoj ekipitaj per elefantoj. Sed ambaŭ popoloj luktis pri vero, liberigo el fremda jugo.

Prozajn partojn kompletigas versoj de Nguyen Trai jen liberformaj senrimaj, jen fiksfirma rimita liriko. Nur nemultaj versoj impresas por europa leganto iom nekutime, orientece. La lingvaĵo estas modela kaj povus esti elzemplodona por kelkiu nia aŭtoro. Forestas gramatikaj malkorektaĵoj kaj preskaŭ tute preseraroj. Pri la perfekta lingvo meritas la tradukintoj Nguyen Minh Kinh kaj Dao Anh Kha /versoj/. Sur la p. 56 devus anstataŭ citaro teksti citro, sur p. 63 tekstu la frazo "Mi ne klare vidas en viaj intencoj..." ...en viajn intencojn... Sur p. 42 kaj 43 estas la verbo "aperti" uzita jen transitive "apertas sin", jen ne-transitive "...provopordo al mi ne apertas", sed pri tiu konfuzo kulpas niaj vortaristoj, ĉar PV listas la radikon "apert" kiel transitivverban: "aperti /tr./", sed PIV kiel adjektivan: "aperta /malfermita/", sekve laŭ reguloj de vortfarado aperti estas ne-transitiva /vidu blanki, sani ktp./ Bonvenaj estus ie indikoj de proksimuma prononcado, ĉar en la vjetnamaj vortoj abundas literoj, kiuj ne estas en la Esp. alfabeto: ch, q, y, x, kies elparolon ne ĉiu leganto povas koni. Cetere, kial iuj naciaĵoj neuzantaj latinan alfabeton kontrabandas en Esp. tekstojn anglajn transliterigojn? Kial do Yoshiwara, Nishimura kaj ne Josivara, Nišimura ks.? Resume la libreto donas al ĉiu instruon legajon pri parto de historio de la brava vjetnama popolo kaj pri ĝia estimata heroo. Jiří Kořínek

---

PARTICIPOJ KAJ KONJUGACIAJ FORMOJ EN ESPERANTO. Aŭtoro Olav Reiersøl. Propra eldono. Deponejo Esperantoforlaget A/S, Oslo 1980. 91 paĝoj 21 x 30 cm. Mimeografita.

Jen nova traktajo pri verĵaj problemoj, speciale pri -ata/-ita. La aŭtoro ĉerpas, laŭ lia bibliografio, el 47 verkoj de pli ol 30 aŭtoroj, inter kiuj mi trovas nur 4 nomojn de aŭtoroj glavdevenaj. Ili estas Zamenhof, Kabe, Lapenna kaj Pumpr. Tiu ĉi propono malĉasas la fakton, ke la problemoj plej multe okupas la neslavajn esperantistojn. Se mi povas juĝi laŭ mia gepatra ĉeĥa lingvo pri aliaj lingvoj slavaj, mia konkludo estas: por la slavaj esperantistoj la afero -ata/-ita ne estas tiom grava, ĉar oni povas klare diferencigi ambaŭ formojn per adekvataj formoj nacilingvaj.



Ekzistas du grupoj de gramatikistoj, kiuj laŭ siaj vidpunktoj pri la karaktero de E-aj verboj dividiĝas je "tempistoj" kaj "aspektistoj". Laŭ alineo 1.16. en la Reiersaĵ-a libro "La tempistoj asertas, ke la konjugaciaj finaĵoj en indikativo esprimas ekakluzive tempusojn". Kio estas la "tempuso", tion diras la alineo 1.4: "Mi uzas la terminon tempuso pri relativa tempo. Tempuso povas esti antaŭtempo, samtempo aŭ posttempo rilate al la nuna momento aŭ rilate al alia preparolata tempo". Kaj alineo 1.17. diras: "La aspektistoj asertas, ke la konjugaciaj finaĵoj parte esprimas tempusojn, parte aspektojn". Alineo 1.18: "La aspektistoj havas diversajn teoriojn kaj regulojn, kiuj kontraŭdiras unu la alian. Tial mi uzas la pluralon aspektistoj pri tiuj teorioj kaj reguloj". Do la aŭtoro estas "tempisto".

En la alineo 1.21. li citas Aktojn de la Akademio 1963-67, laŭ kiuj la "aspektismon" prezentas la verkoj: Plena gramatiko /Kalocsay kaj Waringhien/, Lingvo kaj vivo /Waringhien/, Simpozio pri -ata/-ita /De Hoog, Gregor, Kalocsay, La Colla, Lapenna, Nakamura, Pumpr, Regulo, Schwartz, Sonnenfeld, Waringhien/, Ne kiel Meier! /Schwartz/, Vojaĝo inter la tempoj /Kalocsay/. Do tiuj, ĉiuj, precipe Kalocsay, Waringhien kaj Lapenna, estas la plej ofte kritikataj far Reiersaĵ.

La aŭtoro dediĉas 22 paĝojn al klarigoj pri la tempisma sistemo. Liaj klarigoj, pruvitaj per multaj ekzemploj, ŝajnas al mi ĝustaj kaj konvinkaj, sed ne-slavo devos multe cerbumi, por ke li ekkomprenu kaj poste klare kaj ĝuste uzu la verbajn modojn.

En la libro oni trovas kelkajn angla- kaj germanlingvajjn citaĵojn sen traduko esperanten. Inter ili estas interesa tiu, kiu koncernas la rusan lingvon - do la gepatran lingvon de Zamenhof. Ĝi estas el la libro de J. Forsyth el la j.1970 "A grammar of aspect. Usage and meaning in the Russian verb. Cambridge University Press". /Gramatiko pri aspekto. Uzado kaj signifo en la rusa verbo. Eldono de la Kembridge Universitato./ Ĝi estas: Rezulte oni asertis ofte, ke verba aspekto estas mistero, kiun neniu ne-slavo esperu mastri, ĉar ĝi ŝajnas esti kapriĉa kaj dependa de la 'subjektiva elekto' de la rusa parolanto aŭ skribanto". Mi substrekis la vorton "ŝajnas". Laŭ mia opinio, ne temas pri afero "kapriĉa" kaj "subjektiva", sed pri logiko kaj elektableco inter diversaj verboformoj, kiaj mankas en la neslavaj lingvoj. Kaj mi pensas, ke tiu ĉi fakto obligis al Zamenhof enspiri en la uzadon de la verbaj modoj en E-o tiun fajnmanuskrivecon, kian ĝi havas.

Reiersaĵ plurloke citas tro artfaren konstruitajn argumentadojn de la aspektistoj /ekz. alineoj 3.10-3.11-3.12, 3.17-3.18-3.19, alia kazo 3.20-3.21, 4.2.2, 7.7 k.s./ Ekzemplo: 7.7. Lapenna diras ke kiam oni je certa tempo povis diri "La biero estas trinkita", oni ne poste povas diri pri la sama biero, "La biero estis trinkata", ĉar tio, laŭ Lapenna, signifus ke oni transformus trinkitan bieron en trinkatan bieron. /Simpozio pri -ata/-ita, paĝoj 63-64./

La libro estas tre interesa revuo kaj studmaterialo pri tio, kion oni jam verkis pri la E-aj verboformoj. Adolf Staŭnura

## VALTICE - setkání žáků jazykových kursů .




Toto setkání je již tradiční událostí, kterou organizuje náš svaz pro esperantisty-začátečníky, zejména pro žáky písemných kursů. Účastníci se zde prakticky poprvé dostávají do styku s esperantským hnutím, dostanou potřebné informace o hnutí i organizaci v českých zemích a na Slovensku, setkají se poprvé se svými učiteli/ s nimiž si dosud jenom dopisovali/, poznají funkci naší svazu, seznamují se s prací svazu. Během semináře bylo rovněž promítnuto pásmo Hirošima - Nagasaki s diapositivy i o Světovém kongresu esperante ve Stockholmu.

Letošní setkání, které se konalo ve dnech 31.10. - až 2.11. v krásném prostředí valtického zámku a hotelu Hubertus, bylo jistě zdařilé. Více než 120 osob, dusob se většinou vzájemně neznajících, vytvořilo vnímavý, dobrý a veselý kolektiv. Ke spokojenosti bezesporu přispěly seznávací a společenské večer s tancem, procházky po okolí, besedy s učiteli i volná zábava při kytáře. Věříme, že se mnozí znovu přijedou podívat v příštím roce na podobnou akci a na svoje "mladší" kolegy začínající esperantisty.



# el leterkesto



Al Landaj Asocioj, Redakcioj de Gazetoj kaj Radiostacioj, kaj aliaj.....

Estimatej ,

Ni petas vian afablen helpon en publikigo kaj diskonigo de la suba teksto vobdone ekceptite de la Akademio, kaj anticipe dankas vin.

OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO .

Oktobro, 1980.

La Akademio de Esperanto notas kun forte malaprobato diversajn proponojn, inter si malsimilejn, senci aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniu ortografie sanci estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alie motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. La ajn ortografia sanci nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: "Presejoj, kiuj ne posedas la literon ĉ g ĥ ĵ ŝ ŭ , povas enstati ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u ".

Prezidento : W. Auld

Sekreterio : D-ro A. Goodheir

## ESPERANTO - AGADO EN KRASNODAR

Krasnodaraj esperantistoj aktive komencis novan lernojaron. Komence de septembro 400 afiŝoj kun invitoj al E-ekspozicioj, E-kursoj ornamis la urbon. En septembro - oktobro estis aranĝitaj du grandaj ekspozicioj "Esperanto servas al paco", 3 koncertoj, 7 prelegoj pri Esperanto, en kiuj partoprenis ĉ. 500 personoj. Al E-kursoj aliĝis 200 urbanoj. En Krasnodar funkcias 10 kursoj de Esperanto por komencantoj en E-klubo, en Palaco da pioniroj, en teritoria Domo de laboristoj pri klereco, en teritoria biblioteko, en mekanka teknikumo, en agrikultura instituto, en ŝtata universitato. En universitato Esperanto estas ak-



ceptita kiel oficiala studobjekto en fakultato pri sociaj profesioj. Post du jaroj de studo /po 150 horoj jare/ studentoj ricevas diplomon kun rajto instrui Esperanton. Funkcias tri studgrupoj.

En 1981 krasnodaraj esperantistoj organizas ekspozicion "PRAHA-ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio". Ni petas ĉeĥoslovakajn esperantistojn helpi al ni per diversspecaj materialoj pri Praha - libroj, prospektoj, plakatoj, bildoj, bildkartoj, insignoj, poŝtmarkoj, kartoj, pupoj en naciaj kostumoj k.a. Ĉiuj senditaĵoj estos rekom-pencitaj per memorindaj donacoj kaj fotoĵoj de ekspozicio. Reefu amase laŭ adreso:

SU - 350000 KRASNODAR, p.k.18  
Esperanto - organizajo, USSR

---

ESPERANTISTA KULTURDOMO Kastelo GRESILLON F-49150 Baugé  
Kulturaj aranĝoj 1981

PRINTEMPO: alveno dimanĉon 29-an de marto posttagmeze, foriro dimanĉon 5-an de aprilo matene

- Renkonto de infanoj
- Praktika pedagogio

SOMERO: U N U A P E R I O D O

alveno ĵaŭdon 2-an de julio - foriro merkredon 22-an de julio

- PRELEGOJ diverstemaj
- diskutoj pri la prelegoj
- Studado de la lingvo
- Malkovro de la regiono

D U A P E R I O D O

alveno ĵaŭdon 23-an de julio - foriro merkredon 12-an de aŭg.

- REKTMETODAJ KURSOJ por komencantoj kaj progresantoj
- Studado de la lingvo /tradukado, studado de verka-  
ĵo, gramatiko.../
- Manlaboroj
- Malkovro de la regiono

T R I A P E R I O D O

alveno ĵaŭdon 13-an de aŭgusto - foriro merkredon 2-an de sept.

- STUDADO KAJ PRAKTIKO DE LA LINGVO
- Seminario pri rektmetoda instruado de Esperanto
- Manlaboroj kaj arlaboroj
- Malkovro de la regiono

B.CH.

---

GAZETOJ PRI ESPERANTO

Mi volas aparte mencii du gazetojn. La semajna revuo Nashe rodina /n-ro 33/1980/ en preskaŭ tutpaĝa artikolo de "ĵpa" en-  
havas la kutimen bazan informon pri Esperanto, kun ambaŭflanka  
foto de la pola 100-ŝlota monero "L.L.Zamenhof" kaj kun foto-  
preso de la 1-a paĝo de "Paco", GER-eldono 1979. - Bonegan, mi  
dirus modelan, laŭ la nuna bezono, informartikolon pri engaĝi-  
toco de E. alportis la ĵurnalo de KPĈ en Ŭstí n. Labem PRUBOJ

/9.8.80/, "La serĉanto de interkompreno". Jen modernetila, por la moderna leganto pensiga informaro pri la utiloj de la nuntempa aplikado de E. en internaciaj rilatoj. Neniu historio, sed pleno da konvinkaj faktoj el la nuntempo. Enas interparoloj kun la poeto Jiří Křen kaj Jiří Kořínek kaj docento Vl. Novobilský. "El la laboro de la espero-semantoj neniam kreskis floroj, odorantaj je pulvo - per E. oni ne verkas akrajn diplomatajn notojn, sed leterojn de konfido", konkludas la redakcio. Imp ona kontribujaĵo.

La sama ĵurnalo /2.8./ aperigis tutpaĝen artikolon, kun fotoj, "La morto estas nomata PIKADON", farita laŭ la japania Esp.eldono de "Hiroŝimo". La sama redaktoro konkludas: "Sendube, ni devas alproprigi la arton vivi en epoko de ebla katastrofo. Tio - kiel diris M.Gorkij - supozigas la kuragon ĝisiri la finon de la timo". - Estas kompreneble, ke la sama ĵurnalo kaj alia, "Sever" /pozitive raportis pri la scienca seminario SAEST 80 en Ustí.

Gratulinda aktiveco en tiu urbo kaj regiono.

J. Mařík.

Estimataj gesemideanoj,  
tre agrablajn feriojn ni havis en Ĉeĥoslovakio kaj precipe en Prago dank' al la helpo de multaj gesemideanoj el via ĉefurbo. Do mi sendas tutkorajn dankojn al ĉiuj, kiuj gvidis, akompanis kaj helpis nin dum nia vizito al via asocio kaj al la vespera kunveno, kie ni prezentis lumbildojn.

Plej sincerajn kaj samideanajn salutojn sendas al vi ĉiuj  
Familio René Bastong, Francujo

---

Vážení přátelé esperantisté, železničáři !

Mám-li hodnotit závěrem roku 1980 činnost sekce železničářů ČES, za tento rok, musím jen konstatovat, že její činnost byla narušena. Odešli někteří funkcionáři z výboru a Sekce je - koby přestala existovat. Příčiny jsou vám jistě všem známy a osud o nich by bylo opakování toho, co již řekli jiní přede mnou. Tím nechci říci, že železničáři nebudou dál pracovat pro esperantské hnutí.

Teď je třeba se poučit z minulosti, aby se něco podobného neopakovelo a připravit se na start do roku 1981. Je k tomu potřeba oživit práci výboru a také v železničářských skupinách si připravit plán práce na příští rok. Výbor bude třeba doplnit o nové členy, kteří budou schopni pomáhat, kteří jsou ochotni věnovat esperantu trochu svého volného času pro zlepšení a zdokonalení práce v železničářském hnutí. Začátkem příštího roku je nutno provést výroční schůzi svazu železničářů ČES a zvolit nový výbor. Věřím, že s vaší pomocí začne SŽ ČES znovu pracovat alespon tak dobře jako dříve. Přeji vám všem do nového roku 1981 mnoho úspěchů doma i na pracovišti.

Jaroslav Kašparec, člen výboru SŽ

# Lingva angulo

LA ĤC-DIALEKTO: ARKAIKA FORMO DE ESPERANTO

Bernard Golden

Antaŭ nelonge mi ricevis informilon pri la seminario titolita "Apliko de Esperanto en la Scienco kaj Tehniko" /SAEST/, kiu okazos en aŭgusto 1980 en Ŭstí nad Labem, Ĉeĥoslovakio, sub la aŭspicioj de la scienca-teĥnika sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Traleginte la programon kaj organizaĵn instrukciojn, mi rimarkis apartaĵojn de la lingvouzo en tiu informilo. Kontraŭe al la nuntempa tendenco en Esperantujo anstataŭi "ĥ" per "k" en multnombraj helendevenaj kaj ankaŭ aliaj vortoj /ekzemple "jaĥto:jakto" kaj "ĥino:ĉino"/, ŝajnas, ke la aranĝantoj de SAEST preferas uzi dialekton de Esperanto, kiu odoras je arkaikeco, ĉar literitaj per "ĥ" estas jenaj kvar ofte uzataj radikoj: teĥnik-, ĥemi-, teĥnologi- kaj arkitektur-.

Kelkajn tagojn post la ricevo de la ĉi-supre menciita informilo, alvenis la junia numero de Budapeŝta Informilo /1980/, en kiu aperis kiel parto de la Sciencia Rubriko la kompleta programo de SAEST. Seĝ mi rimarkis, ke la hungara redaktoro faris unu gravan ŝanĝon en la teksto; la vortoj, kiuj en la originalo estis literitaj per "ĥ", havis "k": teknik-, kemi-, teknologi- kaj arkitektur-.

Ne nur hungaraj esperantistoj preferas la modernan ortografion. Mi trovas alian ekzemplon de la uzo de "ĥ", kiu estas eĉ pli bizara, ĉar ĝia arkaikeco datigas de la unuaj jaroj de Esperanto; post unufoja uzo, Zamenhof mem decidis skribi tiun vorton per "k". En Sciencia Revuo /1978, vol. 29, n-ro 2 /130/, p.89/ troviĝas la vorto "ĥarakterizi" en artikolo verkita de la ĉefredaktoro Josef Kavka. Zamenhof uzis la parencon vorton "ĥaraktero" en la rakonto "La Ombro", kiu aperis en Dua Libro de 1' Lingvo Internacia, eldonita en 1888: "Vi havas noblan ĥarakteron!" Jam en 1889 en sia Plena Vortaro Rusa-Internacia li uzis la formon "karaktero", kaj tiel ĝi estas registrite en Universala Vortaro. Pro tio, ne ekzistas iu ajn kialo hodiaŭ skribi "ĥaraktero" kaj "ĥarakterizi" per "ĥ", krom se la uzanto estas obsedata de fiksa ideo pri la sono "ĥ". Kiam la sama artikolo estis represetita en la kolekto de prelegoj de la seminario "Sciencaj Aspektoj de Esperanto", okazinta en Ahrenshoop, GDR, en 1978, la germana redaktoro ŝanĝis "ĥarakterizi" al "karakterizi".

En ankoraŭ unu publikaĵo, pri kies redaktado respondis la sama jam menciita aŭtoro, la metalo, kies kemia simbolo estas Cr estas literita "ĥromo". Tamen, Zamenhof, en sia Esperanta-germana kaj Esperanta-rusa vortaroj skribis ĝin "kromo". En la samaj vortaroj estis registrita "teknologio", ankoraŭ unu zamenhova vortformo.



Konsultante Plena Ilustrita Vortaro /PIV/, oni trovas, ke tiu verko spegulas la modernan tendencon elimini "ĥ", senkciiten de la Akademio de Esperanto en siaj oficialaj publikigaĵoj. Jen kelkaj ekzemploj de la substituo de "k" al "ĥ" en PIV.

p. 1090 - "teĥniko = tekniko"

p. 404 - "ĥaribdo = Karibda... Rim. Same kiel pri la aliaj helenaj nomoj komenciĝantaj per ĥ, serĉu sub K."

p. 65 - "arĥ.... Vd. ark..."

Sur p. 404 post la difino de "ĥemio" estas resende al "kemio", kaj tiu ĉi vorto estas klarigita sur p. 504 kiel "moderna formo de ĥemio". Ĉiuj ĝiaj pluformitaj kaj kunmetitaj formoj havas "k": kemiado, kemiisto, elektrokemio, fotokemio, kosmokemio. La vortformo "arĥitekturo" aperas en Universala Vortaro, sed PIV preferas "arkitekturo".

Tiu ĉi ekzameno de la historio de kelkaj ĥo-vortoj klare pravas, ke ili estas arĥaikaj. Ĝaŭre kaj obstine uzi ilin nuntempe estas indiko de kontraŭprogresiva sinteno rilate al la ĉiam evoluinta Internacia Lingvo, kvazau oni volus krei apartan dialekton.

Kiu ankoraŭ ne estas konvinkita pri la arĥaiceco de ĥo-vortoj, legu jenajn opiniojn cititajn el verkoj de la aŭtoro de Esperanto. Li skribas, ke "ĥ" estas litero "tre malofte renkontata kaj baldaŭ espereble tute malaperonta..." Pri-traktante reformojn en Esperanto, Zamenhof diris, ke "la sono "ĥ" estos tute elĵetata", ĉar "por tre multaj personoj /ĝi estas/ tro malfacile elparolebla..." Li konsilis, ke "en ĉiuj nove enkondukotaj vortoj oni devas eviti la sonon "ĥ" kaj uzi anstataŭ ĝi la sonon "k"."

Apenaŭ fintaĵpinte tiun ĉi artikolon, mi legis en Starto /1979:4/ recenzon pri publikigaĵo de la seminario "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko" /Zilina, Ĉeĥoslovakio, 1978/. En sia priskribo de la enhavo de tiu kolekto da referaĵoj, la recenzisto mem uzis la vortformon "tekniko" kaj ĉe la fino skribis: "Laŭ lingva vidpunkto iom ĝenas la neunueca uzo de la radiko teknik-/teĥnik-." Mia opinio "iom ĝenas" estas tro milda esprimo; mi dirus, ke la uzo de la radiko "teĥnik-" anakronisme agacas la lingvosenton de bonaj esperantistoj.

Junio 1980

## LA ĤO-FONEMO MERITAS PLI DA FAKA PRIKONSIDERO

J. Werner

La eldonanto de Starto ebligis al mi komenti la artikolon de B. Golden "La ĥo-dialekto: arĥaika formo de Esperanto". Mi plene amoskas, ke la aŭtoro estas perfekta kaj elstara esperantologo. Des pli mirigas lia supraĵa kaj nefaka pritrakto de la sfero. Lia esprimmaniero atestas pri subjektiva kaj emocia starpunkto /esprimoj: ĥo - dialekto, arĥaika formo, bizara, kontraŭprogresiva, agacas la lingvo-

senton k.s./, kiu apenaŭ povas konvinki pensantan leganton. La mencioj pri la sinteno de Zamenhof kaj la Akademio de Esperanto estas formulitaj evidente malklare kun intenco subteni la starpunkton de la aŭtoro. Leganto povas prave demandi, kial Zamenhof estis enkondukinta la fonemon "h", se li poste malkonsilis /?/ uzadi ĝin, kion la Akademio rilate la ĥo-formojn sankciis ?

Starto ne povas liveri tiom da spaco, kiom postulas serioza pritrakto de la afero, sed al ĉiu interesiganto pri iom detala kaj serioza pritrakto mi rekomendas legi tekston de la prelego "La fonemo Ĥ kaj ties transformoj en la internacia scienca leksikologio", kiun RNDr. J.Kavka, CSc.faris en la seminario "Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko", okazinta fine de aŭgusto 1980 en Ústí nad Labem. /Kolekto de la seminariaj referaĵoj estas mendebla en ĈEA/.

Kiel funkciulo de la scienca-teĥnika sekcio de ĈEA mi partoprenis organizadon de la menciita seminario. Kelkaj el ni, organizintoj, uzis kaj uzas la formojn teĥnik-, ĥemi-, teĥnologi- k.a. ne pro "prefera uzo de dialekto de Esperanto, kiu odoras je arkaikeco", kiel supozas B.Golden, sed pro evidenta ekzistaro de la ĥo-fonemo en Esperanto, pro ĝia utilo en evitado de homonimeco kaj ne lastavice pro dezirinda procedo al kohereco de planlingva scienca leksikologio. Malgraŭ la gravaj motivoj ni ne trudus la ĥo-uzadon al la kunlaborantoj, prelegantoj en la seminario. La prelego de B. Golden ja estas publikigita kun la ko-formoj. La often anstataŭigadon de ĥo-formoj per ko-formoj mi vidas precipe kiel esprimon de persona gusto. Ĝi povas esti konsiderata fenomeno moda, sed ne moderna, ĉar mankas al ĝi iu grava racia pravigebla, kiu superus utilon de la fonemo "ĥ".

### ĈU ESPERANTO ESTAS FACILA LINGVO ?

Al tiu demando ĉiu respondos jese. Oni diras "multoble pli facila ol la naciaj lingvoj"; en Budapeŝta Informilo mi legis sobran aserton, ke kvinoble. Trudiĝas tamen dubiga demando, kial aperas daŭre tiom da gramatikaj eraroj en leteroj de kelkaj esperantistoj praktikantaj la lingvon 30, 40 jarojn aŭ eĉ pli. Tiuj eraroj /ne preseraroj/ aperadas en gazetartikoloj de pluraj aŭtoroj, ja inter ili eĉ aŭtoroj de lernolibroj, tie, kie ne estas plenkapablaj redaktantoj aŭ la redaktoro ne havas tempon korekti la manuskriptojn kaj poste la presprovaĵojn. Antaŭ ol ni ekzamenos kaŭzojn de ĉi fenomeno, ni rigardu kelkajn tiajn ĵustrovitajn malkorektaĵojn en la ĉijaraj ekzemploj de nialandaj periodaĵoj. Unue el Starto 1 /enkrampe la korekta vorto/:

- ...heraldikistoj - ĵus pro la multjara diverseco /guste/.
- ... en pluraj ĉeĥaj kaj moraviaj urboj /bohemiaj/. Starto 2.
- ... kiel kaj kiajn mi edukos miajn infanojn /kiaj/ "
- ... partoprenos ĉiuj aligitaj kestoj /aligitaj/ "
- ... la aligitajn propagandajn kestojn /aligitajn/ "
- ... La Kongreso en Stockholm finis, vivu la 66a /finiĝis/ Starto
- ...kiam oni volas anstataŭi jam kutimajn /anstataŭigi/ "

Informoj el sekretarejo /sekretariejo/ "

...devige kontregistras sekretejo de CEA /sekretariejo, sekretariato/ "

...povas la sekretejo doni... /sekretariejo/ "

...eldoni...tradukan vortaron kiel helpilo /helpilon/ La Progreso 2

...inkluzive la kinejo kaj restoracio /kinejon kaj restoracion/ "

...gvidis...strato trans lokoj /lokojn/ kien! "

...sangoj de klimato...kauzis /sangojn/ objekto! "

Hodiaŭ plej disvastiĝita konceptaro /disvastiĝinta/ ntr ! "

Surbeze tiu oni konstatas /de tio/ "

Ŝi pikvundis sian fingron kaj sangmakuligis /sangmakulis/ "

...trionon da prezo... /de/ post onoj ciam de! La Progreso 3

Nek per elsbezo...oni ne povas... /EC/ "

...floro kaj fauno... /flauro/ "

...kvoto de la plej ofte troviĝataj /troviĝantaj/ ntr! "

...malnoviĝitaj produktmenieroj.../malnoviĝintaj -iĝ ntr! "

...oni akiris...cent miloj tunojn.../cent milojn da tunoj/ "

...oni uzas kiel multekosta materialo /multekostan materia- lon/ "

...de tiam pasis 1000 jarojn /jaroj/ "

Avicenna kompletis ĉiujn... /kompletigis/ "

...p uen trans jarcentoj /jarcentojn/ kien? "

...1 cigas neripozitajn glotojn /neripozintajn/ ntr. "

finis kun tremblanta voĉo svisano.../per tremanta voĉo sviso/ "

...de sentronigitaj potentatoj /monarĥoj,potenculoj/ "

...grandukoj kaj arkivevodoj... /ĉefdukoj,arkidukoj/ "

...braceleto larĝa 5 centimetroj /centimetrojn/ "

...homa suferado kortuŝigas lin /kortuŝas lin/ "

turniĝante sin ĉe la urborando /turniĝante ĉe/ "

Bad Salzigen estas situata /situanta/ ntr ! "

Immelben estas situata /situanta aŭ situigita/ "

Evidentajn preserarojn mi ne citas. Trarigardo de kelkaj aliaj periodaĵoj certe alportus ankaŭ rimurkindan rikolton. Kaj same en lernolibroj ofte ne mankas malkorektaĵoj erarigaĵ por la lernanto. Pri privataj leteroj mi eĉ ne parolu, tie ofte svarmas eraroj.

Do kie kaŭzas tion, ke nian facilan lingvon scipovas perfekte relative malmultaj homoj?

Do unue: lingvo, se ĝi pretendes esti perfekta kaj ekzakta esprimilo por sferoj de homa aktivado, estas instrumento tre subtila kaj neniel simplega. Tio validas eĉ por la relative regula lingvo planite kiel Esperanto. Komprenible la bazaj 16 reguloj de Esperanta gramatiko, propagande tiel emfazataj, ne ampleksas ĉiujn regulojn de la lingva funkciado, de ĉiuj rilatoj, de vortfarado ktp. Ja pri kio parclus poste la preskaŭ 500-paga Plena Gramatiko? Due: en sia gepatra lingvo oni dedikas 10 kaj pli da jaroj al sistema lerneja studado de la lingvo - kaj eĉ poste oni ankaŭ iam eraras. Al studo de E. oni kutime dedikas etan onon de tiu tempo. Tuj eĉ ne persistas trastudi ĝin ĝis la fajnsaĵoj de la lingvo. Oni inklinas konsideri sin tre baldaŭ perfektulo kagabla verki, ja eĉ verki lernolibrojn. Bedaŭrinde ne ekzistas aŭtoritataj instancoj, kiuj kapablus malhelpi tion



fuŝadon, krom kelkfojaj kuraĝaj kaj kompetentaj kritikoj. Kiu povus ordoni al entuziasma verkemulo, tre ofte sincera batalanto por nia afero, iam disponenta eĉ pri sufiĉa kapitalo, unue trastudi Plenan Gramatikon, konsultadi normigajn vortarojn kiel PIV kaj traleĝi majstroverkojn de nia literaturo far la korifeoj de IL, antaŭ ol verki publike, redakti gazetojn, verki lernolibrojn?

Iam kondukas al eraroj malklaraĵoj en lernolibroj. Antaŭ 13 jaroj mi pruvaĝis, ke simpla adjektivo ne difinas la substantivon kaj ke do antaŭ ĝi ĉe kvantesprimo povas stari prefikso DA kaj ke oni ne miskomprenu ekz. rimarkigon en iuj lernolibroj, ke DA ne darfus stari antaŭ adjektivo. PIV diras ĉe vorto DA, rimarkigo 3 /paĝo 163/: "Oni ne devas uzi da...antaŭ la montraĵ, posedaj kaj nombraj pronomoj aŭ adjektivoj." Kaj mi diris tiam: "Adjektivo per si mem ne estas difinilo de la substantivo. Oni do povas ŝarbone diri: aldonu kuleron da tritikfaruno, aŭ kuleron da tritika faruno. Sekvu kelke da ekzemploj pri la ĝenerala uzo de prepozicio DA antaŭ adjektivo:

...tiom da novaj naciaj lingvoj... G.Waringhien: Lingvo kaj Vivo  
p. 342  
...svarmon da malvive-naskitaj projektoj " " " "  
p. 358  
Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado... Zamenhof, Kongresa parolado ĉe la 8-a UK p. 62  
...sufiĉe da liberaj lokoj... T.Kilian, ABC de Esp. p.34  
...nombro da nigraj-blankaj fotoj Esperanto de UEA, dec.1967  
Fasko da nordfrancaj informoj... " " " " dec.1967  
p.178

Kaj citebluŝ pluraj ekzemploj. Jes, ekzistas ankoraŭ kelkaj pluaj malklaraĵoj, kiuj povas konduki al eraro. Pri iuj mi jam insiste atentigis.

Resume: Esperanto estas relative facila lingvo. Sed ne tiam, ke oni ĝin lernu suprajse se oni volas verki, redakti, instrui. Oni devas ĝin profunde studi, ja preskaŭ daŭre. Ĝi povas fieri, ke oni komprenas la diritaĵon eĉ en fuŝlingva letero. Sed per tio oni ne kontentigu kaj strebu al laŭebla perfekteco. Mi konis simplajn laboristojn, kiuj senerare parolis kaj korespondis kaj ankaŭ altlernejan profesoron, kiu dum tridek jaroj faras la samajn krudajn gramatikajn erarojn, pekas kontraŭ akuzativo k.s. Dependas ne nur de talento, sed ankaŭ firma volo gvidas al ĝisfunde aŭ almenaŭ bona lingvoscio.

Jiří Kořínek

---

## JUBILEOJ DE LA ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-MOVADO DUM LA 1981-j.

---

### ELSTARAJ EVENTOJ :

- 1901 estiĝis E-klubo en Brno / " Unua Aŭstria Societo E-tista?.
- 1911 Laborista Unuiĝo Esperantista, fako de Laborista Akademio en Praha, fondita de Fr. J.Chaloupecký
- 1921 XIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Praha, I-a/ Konstitua/ Kongreso de SAT en Praha

## ELSTARAJ PERSONOJ :

9. 2. 1891 naskiĝis Marie Strejčková, aktivulino de " Verda Stacio " en Brno
24. 4. 1891 naskiĝis prof. D-ro Hugo Jokl, pioniro de Esperanto, verkisto kaj kaj aŭtoro de lernolibro
28. 6. 1871 forpasis pentristo - esperantisto, nacia artisto Martin Benke
30. 6. 1891 naskiĝis František Pytloun, elstara verkisto kaj tradukisto
19. 7. 1896 naskiĝis Ota Ginz, verkisto kaj tradukisto
- 2.11. 1891 naskiĝis Otto Sklenčka, funkciulo
- 6.12. 1901 naskiĝis Jaroslav Šustr, konata esperantisto en Prago, eksa ĉefdelegisto de UEA, ĉefo de E -biblioteko
- 9.12. 1911 naskiĝis Jen Filip, aŭtoro de ĝis nun plej grandaj Ĉ-E kaj E-Ĉ vortaroj, aktivulo de E-movado en Náchod

## ALIAJ ELSTARAJ PERSONOJ SEN INDIKO DE LA DATOJ

- 1841 naskiĝis František Vymazal, aŭtoro de la lernolibro "Esperanto snadno a rychle/ Esperanto facile kaj rapide /
- 1871 naskiĝis Běla Reichlová-Krspková, lernantino de F.V. Lorenz, tradukis la kanton "Ruĝa Ŝtandardo" en la ĉeĥan lingvon
- 1911 naskiĝis konata aktivulo de E-movado en ĈSSR kaj unua prezidento de Ĉeĥa Esperanto Asocio Josef Vitek.
- 1921 forpasis Josef Hybeš, parlamenteno, elstara laborista aktivulo kaj apoganto de Esperanto en Brno



Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj per detalaĵ informoj!

Gesamideoj! Kiu povas prunti al mi vortaron "Grand dictionnaire français - Esperanto" kaj kiu povas prunti ĉiujn volumojn de la gazeto HUNGARA VI VO? Tiun-ĉi literaturon mi bezonas por prilaborado de Esperanta botanika vortaro. F. Mlynář, Králická 689 LANŠKROUN, 563 01, Ĉeĥoslovakio.

Mi volas aĉeti de W. Auld "Paŝoj al plena posedo" aŭ interŝanĝos por E-gazetoj. Adreso: Vladimír Rotrekl, 66902 ZNOJMO-Dobšice 297.

Hungara lernanto kun knabo  
Lia aĝo 16 jaroj: Kovacs  
Béla, Pötöfi tér 8, DEBRECEN  
H-4002.

Ende V. Albert, Rakoczi út. 48  
EGYHAZASKOZÁR. H-7347,  
Andrea Jenko, Hatos Gusztav  
út. 10. 7347 EGYHAZASKOZÁR .

Erikö Györi, TOFÜ, Koszut  
utca 46, H- 7348

La 21-jara studento pri li-  
teraturo, fotografado :  
Vladimír Zubov, st. K-Marka  
77-47, SU 610 000 KIROV

## BRNO

Ĉi monste sepdekjarigis unu el  
la plej eminentaj membroj de  
Divadlo Bratří Mrštíků - Alena  
Růžičková-Pavlinová, kaj same  
eminenta anino de EK en Brno.

La 11.11.1980 aranĝis EK Brno  
solenan koncerton el kamer kaj  
kentkomponaĵoj de L. van Beet -  
hoven, sub artisma gvido de He-  
lena Halířová.

# RONDETA VIVO

FRÝDEK-MÍSTEK - La 19.10. an-  
taŭtagmeze en kafejo Esperanto  
amika kunesto kun dana s-ano E.  
Windeballe. Posttagmeze parola-  
do de Ing. K. Janouš kaj M. Op-  
lerová, partoprenintoj de UK en  
Stockholm. Temo: Ĉi-foje Stock-  
holm - kun diapozitivoj.

PŘEROV - La 8.10. aranĝis Esp.  
klubo publikan prelegon de L.  
Chytil pri la libro "Hiroŝima -  
Nagasaki." Post la prelego o-  
kazis diskuto, dum kiu ĉiuj  
ĉeestintoj konfirmis sian vo-  
lon kunlabori por progreso kaj  
justeco, estimantaj liberecon  
kaj dignon de la homa persone-  
co kaj por la mondo sen mili-  
toj. J.T.

KARLOVY VARY - En K.V. okazas  
ĉiujare t.n. TOURFILM, komer-  
ca festivalo de turismaj fil-  
moj, samtempe propagandantaj  
servojn de diversaj vojaĝ-agen-  
tejoj. Esperantistoj en K.V.  
eldonis ĉi-okaze propagandilon  
"Esperanto-internacia lingvo  
de filmo" pasintjare, kaj nun-  
jare en la tagoj 29.9.-4.10.



ili prezentis Esperanton kiel  
lingvon de turismo en vitrinoj  
de bufeto "Karlovarka" kaj pre-  
zentis tie afiŝon pri la nova  
kurso de E. J.K.

TÁBOR - EK aranĝas ekde oktobro  
kursojn por komencantoj, progres-  
sintoj kaj lerneja junularo. Ek-  
de la 6.10. klubkunvenoj ĉiu-  
lunde je la 18-a en Střelnice.  
HAVÍŘOV - post ferioj la agado  
de la loka grupo revigligis. S-  
anino Pastrnáková prelegis pri



sia vojaĝo en Japanion /kun belaj koloraj diapozitivoj/. Ŝi renkontis tie siajn E-korespondemikojn, vizitis la centron de la jap.s-anoj en Tokio kaj estis pridonacita. Prof. Miroslav Pastrnák per prelego prezentis la libron Hiroŝima-Nagasaki, kiu animekuis ĉiujn ĉeestantojn. La membroj de la LG kontribuis al la solidareca fonduso kun Vjetnamio. Kurson por 8 komencantoj gvidas prof. M. Pastrnák kaj 7 perfektigemuloj studas la libron Paŝoj al plena posedo. Distrikta gazeto Zprávy Karvinska aperigis ampleksan artikolon pri la agado de la LG. AST.

ZNOJMO - Ekde septembro n. estas gvidataj du kursoj, unu en agrokultura mazlernejo, alia en Klejiga Societo. Instruas s-ano V. Rotrekl. La kursojn partoprenas entute 28 gejunuloj. La 23. 10. okazis parolado pri UK en Stokholmo. Parolis s-ano J. Polák el Prosiměřice kun koloraj diapozitivoj. En sept. okazis parolado de s-ano V. Rotrekl pri la temo "Tra Hungario", kun samtempa ekspozicio de prospektoj, fotoj, bildkartoj kaj suveniroj.

BRNO - Ekde oktobro n. estas gvidata kvarmonata kurso de E., por 18 partoprenantoj, instruas J. Vondroušek.

ČESKÉ BUDĚJOVICE - EK eldonis kiel suplementon al gazeto La Progreso poemojn de F. Halas "Nia sinjorino B. Němcová" en traduko de J. Kořínek. Plue eldonis la sama klubo belan publikacion "Albumo de sudbohemiaj memorindaĵoj Burgoj kaj kasteloj. Verkis Ing. I. Papírníková, ilustris B. Kozel.

ÚSTÍ nad Labem - La ER ĉe la Kulturdomo ODKP en Ústí nL. povas registri por ĉijaraj someraj monatoj purajn aprezindajn aranĝojn kaj agojn. Estis okazigita sukcesa Seminario pri apliko de

Esp. en Scienco kaj Teĥniko, kiun partoprenis ĉ. 90 personoj, ĉefe fakuloj el la scienca mondo. Inter ili estis partoprenantoj kaj prelegantoj el eksterlando: Hungario, Pollando, Bulgario, GDR, Nederlando. La sciencaj prelegoj estis publikigitaj en ampleksa impona almanako. Ĉefan meriton pri la aranĝoj, logigoj ktp. havas la prezidanto de la rondeto, doc. d-ro Vlastimil Novobilský, CSc. En la kultura programo aktivis niaj elstaraj artistoj, solkantistoj de ŝtata Operteatro en Ústí Miroslav Smyčka kaj J. Scholzeová. Fama aktorino Eva Seemannová el Prago prezentis kontraumilitan monologan teatraĵon de Valda Vinař, premiitan de la Belartaj Konkursoj en Stokholmo. Dum julio kaj aŭgusto aperis en la nordbohemia ĉefjurnalo Právo dufoje tutaĝa artikolo pri Esperanto, el kiu unu rilatis al japana dokumenta libro pri Hiroŝimo kaj Nagasaki. Pri tiuj ĉi artikoloj meritas ilia aŭtoro d-ro J. Votruba, kiun interesigi pri nia afero sukcesis doc. d-ro Novobilský kaj ampleksa letero de Jiří Karen. Krome aperis ankoraŭ tri kurtaĵaj artikoloj pri Esperanto en Právo kaj Sever. La japana libro estis utiligita ankoraŭ ĉe pluaĵinstancoj. J.K.

---


## KRONIKO

---

Post pesintjara sukcesa operacio s-ano Mikuláš ČEKAL /Niko/ el Děčín travivadas sian 65-an jubilean junagon /22-12-1915/, kaj antaŭe dankas al ĉiuj por bondeziro.

---

# Krucenigmo



Horizontale: A. Signalo pri danĝero /R/; ekzisti; fermi truon /R/; rifuĝejo. - B. Insulo en Pacifiko; la unua parto de la mot; vulkano sur la insulo Mindanao. - C. Mondparto /R/; so-  
vaga europa bovo /artikolo kaj R/; sufikso karakterizanta per-  
sonon; markrustulo /R/; parto de poemo. - Ĉ. Arba frukto /R/;  
speco de pino /R/; agado por kontentigi bezonon /sen fina o/;  
urbeto en Rumanio; elfosejo de karbo /sen fina o/. - D. Arbeto  
kun rozaj aŭ blankaj floroj, kreskanta en sabla tero /R/; se-  
sedra ujo /R/; jukanta hautmalsano /R/; el malmola korpoparto  
farita; urba promenejo /R/. - E. Parto de vegetaĵo /R/; ujo  
por kolekti voĉdonojn /R/; gajni anon /R/; mallongigo de Kom-  
unisto Internacio; bruo ĉe rompado /R/; urbeto en Etiopio;  
aviadilo movata per reaktoro /R/. - F. Finajo de futura pasivo;  
defendi aferon /R/; parto de maldika intesto /R/; nediferenci-  
gebla; kampa mezurunuo; speco de mevo; angla mallongigo por  
s-ro. - G. El multekosta metalo farita; la dua parto de la mot;  
sufikso por femalo. - Ĝ. Fari iun ano; adepto de "reformita  
E-o" el la jaro 1907; nagbirdo.

Vertikale: 1. Akiro por mono. - 2. Pensiulo. - 3. Eldoni /sen  
fina i/; prefikso por longa antaŭtempo. - 4. Speco de poezio  
/R/; soldato-lancisto /R/. - 5. Kunsido de kriminala tribunalo  
/R/; fendigi. - 6. Gimnastikilo /R/; fiksi en alto ĉe unu ek-  
tremo /sen fina l/. - 7. Aroma vegetaĵo /R/; konfirmi paspor-  
ton. - 8. Herbeca planto /R/; rilatanta alon. - 9. Svingi ĉien  
kaj reen; peti favoron de dio. - 10. Ronda elstarajo ĉirkaŭ ko-  
lono /R/; granda domaro /R/; natria hidroksido /R/. - 11. Antaŭ-  
enmovig' per piedoj; akiri proprajn per seninterrompa poseda-  
do. - 12. Persopa pronomo; speco deambio /artikolo kaj R/. -  
13. Angle "ankau"; graso /R/; kapablo krei /R/. - 14. Kemia  
elemento Os /R/; nobelo. - 15. Muzika instrumento; opera kan-  
taĵo /R/. - 16. Surskribo sur poŝta sendaĵo /R/; rilatanta ko-  
lekton de legoj. - 17. Urbeto en Hispanio; profite uzeblan. -  
18. Mallarga terkolo inter du maroj /R/; multnombra. - 19. Ko-  
nifera arbo /R/; parto de okulo /R/. - 20. Kontraŭstaroj; frak-  
cio. - 21. Neprofitemo. - 22. Parazita insekto /R/.

Helpe: R = radiko. - B. Epi; Apo. - Ĉ. Ineu. - D. Prurig/o/.  
- E. Imi. - S. Enant/o/. - 17. Zas.

Adolf Staŭra.

Sufiĉas sendi la ĝustan tekston de la moto. Limdato:

Pro malprokrasta aperigo de STARTO n-ro 5/80 ni atendas same kun la solvoj por tiuĉi krucnigmo ĝis 20.2.1981. En la n-ro 1/81 ni publikos ĉiujn solvintojn, de de STARTO 5 kaj 6/80. Dankon por via kompreno.

## INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

Na návrh některých našich čtenářů jsme v tomto čísle upustili úmyslně od zrovnávání řádek textu po pravé straně. Snižší se tím, pochopitelně, pracnost při opisování textů. I když podobné tendence se vyskytují v různých tiscích/ na př. v centrálním časopise UEA Esperanto/, rádi bychom znali váš názor, zda se vám takto připravené texty z STARTO budou líbit. Prosíme o vaše vyjádření obratem.

Tempo de tempo ni legis en la presejoj PANORAMO kaj HORIZONTO / eldonataj de t.n. NEM= Neutrela Esperanto - Movado / plen-  
doj pri teruraj komunistoj, kiuj regas tutan E-movadon, ĉefe  
UEA, sed ankaŭ la Internecien Vegetaran Asocion. Kiel komencon  
de ĉio estis la "puĉo" en Hamburgo /1974/. Prof. Ivo Lapenna  
prikribis tiun situacion en broŝuro Hamburgo en retrospektivo.  
Vi mem nun povas prijugi el suba artikolo pri kia "puĉo" en Ham-  
burgo temis kaj kiajn fantasmegoriojn volas iu prezenti kiel ve-  
ron.

En HdE, n-ro 14 kaptis nian atenton redakcia artikolo NEFORGESITA  
REZOLUCIO, kiu analizas konatajn faktojn, pro kiuj prof. I. Lapenna  
en Hamburgo akiris ne pli ol 25% da komitatanoj voĉoj /1974/,  
kvankam 2/3 el futnombro estis el okcidentaj landoj kaj 1/3 el lan-  
doj socialismaj... Ĉu la samaj komitatoj, kiuj en Madrido /1968/  
unanime voĉdonis por li, estigis favorantaj komunismoj? Nenie  
I.L. informas, ke en Londono /1971/ li apenaŭ estis reelektita  
/plimulto de ĉu voĉoj/.

La artikolo prave mencias: ... Ĉiu homo havas virtojn kaj malvirtojn,  
meritojn kaj malmeritojn. La fakto, ke oni kritikis liajn era-  
rojn neniel nuligas liajn meritojn.

Cetera li mem devus objekte analizi sian agadon kaj modeste  
akcepti, ke almenaŭ kelkrilate li eraris, kio apartenas al la  
homa naturo. La eraroj, en kiuj li obstinas, eksplikas kial ege  
malmultaj esperantistoj senkompromise solidarigis kun li, kial  
multaj liaj pli fruaj amikoj distancigis de li, kial aliaj liaj  
amikoj parte staras de lia flanko, parte publike kunlaboras kun  
UEA kaj, fine, kial la grandega plimulto de la Movado malaprobis  
liajn privatajn betalojn kontraŭ UEA.



## ZASEDAL ÚV ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU

Na 8. listopadu proběhlo podzimní plenární zasedání ÚV ČES. Tento vrcholný orgán svazu se zabýval několika velmi důležitými otázkami pro další život naší organizace. Byla vyslechnuta zpráva o činnosti předsednictva svazu, v níž se hodnotí vývoj svazu od posledního zasedání ÚV s potruhuje se nutnost zvýšit činnost některých orgánů svazu, rozšířit řady výborů těchto orgánů/ sekcí a komisí/, aby práce nezávisela jenom na několika jednotlivcích. Požadovaná situace je i v mnoha našich místních skupinách.

Po zprávě o činnosti předsednictva byly projednány návrhy na plán činnosti svazu pro příští rok a rozpočet svazu i návrhy na změny ve stanovách svazu, které by měl projednat IV. sjezd ČES začátkem roku 1982. Předpokládá se, že návrh nových stanov obdrží všechny naše místní skupiny, sekce a komise k připomínce. Jarní zasedání ÚV pak přijme definitivní text stanov. Tyto změny mají přispět k lepšímu řízení organizace, ke zvýšení ekonomických možností a k prohloubení demokratického centralismu.

Ze odstoupivšího člena ÚV ing. Kováře byl kooptován za člena ÚV doseavadní náhradní ÚV ČES s. MUDr. V. Škoda.

Závěrem svého jednání přijali členové zasedání usnesení v němž vyslovují souhlas s nevrženými dokumenty a zprávami.

### SCIENC-TEĤNIKA KONFERENC EN Ž I L I N A

Post sukcesaj scienc-teĥnikaj seminarioj okazintaj en Žilina /1978/ kaj Ustí n/L./1980/ okazos en la tagoj 15.-18.8.1981 en Žilina l-a konferenco pri "Apliko de Esperanto en la scienc-teĥniko". La organizantoj de la konferenco estas Scienc-teĥnika sekcio de AESSR kaj Domo de Sindikatoj en Žilina.

Dum la konferenco fakuloj el diversaj landoj pritraktos jenajn temojn: Tendencoj kaj taskoj en la sciencia aplikado de Esperanto, internacia kunlaboro, perspektivoj de fakaj E-arangaĵoj, Esperanto en la servo de neesperantista faka publiko.

En apartaj fakaj sekcioj okazos prelegoj el:

- a/ lingvonormigo, faka terminologio, vortaristaj laboroj
- b/ komputiko, matematiko
- c/ maŝinkonstruado, elektroteĥniko, elektroniko
- d/ ĥemio, vivomedio
- e/ konstruado, akvomastrumado
- f/ aliaj fakoj

Enkadre de la konferenco okazos paneldiskutoj en unuopaj sekcioj kun la celo de pli intima kunlaboro de fakuloj el diversaj landoj. Oni planas ankaŭ fondi koordinan komisionon por koordinado de scienc-teĥnika agado en unuopaj landoj.

Tuj post la konferenco, en la tagoj 18.-23.8.1981, okazos en la pitoreska ĉirkaŭaĵo de Žilina /Vrátne-valo, Rokaro de Súlov/ Turismaj Tagoj. Estas planata ankaŭ Renkontigo de E-familioj.

Prelegojn necesas anonci kaj manuskriptojn sendi ĝis fino de marto. Informojn petu ĉe: Ladislav Henzel, Hliny 406 A, 010 01 Ž i l i n a , ĈSSR.

VL.Němec

## ESPERANTISTOJ EL PŘEROV EN HUNGARIO

Laŭ kontrakto de la Esperanto-rondo ĉe uzina klubo de la Pře-rovaj maŝinfabrikoj kun la Esperanto-klubo de departemento Vas /Hungario/ vizitis okmembra delegacio el Přerov la ĉefurbon de Vas, Szombathely, komence de monato aŭgusto ĉi-jare. Kune kun la hungaraj geamikoj ni povis ekkoni la vidindaĵojn de Szombathely kaj fari komunajn ekskursojn en aliajn urbojn: en Kőszeg apud la aŭstria landlimo, en Keszthely ĉe la fama lago Balaton, en Sásvár kaj en Ják. Regis bonega vetero. La gastameco kaj afableco de hungaraj geamikoj estis ekzempla.

Lad. Chmelík

Dua plej grava ĉeĥa tagjurnalo Zemědělské noviny /Agrikultu-rista gazeto/ aperigis la 23-an de okt. sur la fruntpaĝo arti-kolon, kiun ni prezentas en Esp. traduko:

### INTERNACIA LINGVO.

"Estas terure alrigardi kiel dum scienca konferenco centoj da homoj same vestitaj, same aspektantaj kaj laborantaj en sa-maj zonoj de homa scienco, ne kapablas interkompreniĝi," pro-klamis unu el scienculoj.

Lingva Instituto de la Akademio de sciencoj en Soveta Unio en siaj esploroj asertas, ke unusola internacia lingvo - ESPERANTO - estas efektive taŭga kiel tia lingvo. Ĉu ĝi vere estigos oficia- la lingvo por interkomprenigo sen tradukistoj?

Jelč

## INTERNACIA RENKONTIĜO ĉe B E R L I N

Ankaŭ 1981 okazos Internacia Esperanto-Feriado ĉe Berlin sur la internacia kampadejo "Krossinsee". Ĝi okazos de 14. - 26. 9. 1981. La partoprenantoj loĝos en malgrandaj domoj, ki-uj troviĝas sur la tereno de la kampadejo "Intercamping", ĉi ĉirkaŭitaj de arbaro, rekte ĉe la bordo de la lago. En ĉiu dometo estas 4 ĉambroj kun po 3 litoj. En ĉiu ĉambro estas komforto /installitaj lavopelto kaj elektra akvoboligo, duŝ-banejo en la domo k.t.p./.

Dum la unua semajno /de la 14a ĝis la 19a de septembro/ la arango pasos laŭ plano /t.e.: antaŭtagmeze lingvaj lecionoj, prelegoj, seminarioj k.t.p., posttagmeze komunaj migradoj, ekskursoj aŭ bapado/, sed la duan semajnon la partoprenantoj travivu tute laŭvole. Ekzistas multaj eblecoj viziti la ĉef-urbon de GDR, Berlin, la palacon kaj ĝardenan urbon Potsdam kaj aliajn vidindaĵn lokojn.

La partoprenkotizoj sumigas je 200 markoj por GDR-anoj, 250 markoj por eksterlandanoj. Per tiuj kotizoj estos rekom-pensitaj: - 13-foja tranoktado, - 5-foja tagmanĝado /15a ĝis 19a de septembro/kaj - kostoj por laŭplanaj arangoj /15a ĝis 19a de septembro/.

La partoprenantoj mem devas zorgi pri la maten- kaj vesper-manĝaĵoj dum la tuta restado en la kampadejo kaj krome ankaŭ por la tagmanĝaĵoj dum la dua semajno /20a ĝis 26a de sep-tembro/. Sur la tereno de "Intercamping" ekzistas rekomendinda restoracio, kie oni bonpreze povas tagmanĝi, kaj krome tie

troviĝas vendejo, kie oni povas aĉeti la ĉiutage bezonatajn aĵojn inkluzive nutraĵojn por la maten- kaj vespermanĝo.

La nombro de la disponeblaj litoj estas limigita! Petu senprokraste /limdato: 30a de majo 1981/ aliĝilon kaj precizan programon de: Kulturligo de GDR, Distrikta Laborrondo Esperanto/Berlin, 102 BERLIN, Breite Str. 35 - 36.

Interesuloj postrevene ricevos aliĝformularon, kiu estu nepre ĝis la 31a de julio 1981 resendita al la supre nomita adreso. Ĝis la sama limdato oni transpagu la partoprenkotizojn al Bezirksarbeitskreis Esperanto/Berlin im Kulturbund der DDR, Poŝta ĉek-konto Berlin 487 40. En esceptaj kazoj eksterlandanoj, post interkonsento kun la organizanto povas pagi surloke.

Kiel ni sciigis el la taga preso kaj el la ĵus aperinta numero de la gazeto Nové Knihy /Novaj Libroĵ/, estis nia poeto kaj iniciatinto de la Literatura Sekcio de ĈEA s-sno Jiří Karen honorita per la unua premio t.n. jarpremio de la eldonejo Melantrich por sia poemaro Hledání modrého tónu. La kompleta poemaro estas ankaŭ esperantigita far Jiří Kořínek. Jiří Karen, la aŭtoro de pluraj eldonitaj ĉeĥaj poemaroj, kiu preparas nun tri pluajn poemlibrojn, pri Beethoven Než udeří devátá vlna /Antaŭ ol batos la naŭa ondo/, pri L. Janáček - Kamennité cesty /Stoncaj Vojoj/ kaj poemaron Stromy jdou do města /Arboj iras urben/, gajnis ankaŭ ĉi-jare la duan premion en la kategorio Originala poezio en la Belartaj Konkursoj de UEA dum la Stockholma Universala Kongreso. La premiigoj aldonigas al jam ricevitaj pluraj premioj kaj altaj distingoj. Al nia fama kaj por nia afero daŭre klopodanta semideano ni kore gratulas.

Jiří Kořínek

Ĉefpremion en la 20-aj Internaciaj Floraj Ludoj en Barcelono t.n. Naturen Floron ricevis Jiří Kořínek el Ústí n. Labem, por sia poemo Kanto de Salomon al Sulemit. Artisman diplomon kaj monpremion transdonis la Regino de l' Poetoj, f-ino Ángels del Pozo, la premiitan poemon deklamis s-ro Llibert Puig, sekretario de la Kataluna Kunordiga Komitato de la Poezia Solenaĵo en Vilanova i la Geltru.

#### ATENTIGO POR ĈIU NIA LEGANTO

Se vi volas sendi el ni viajn informojn, artikolojn, rimarkojn, ne forgesu, ke findatoj por niĝaj numeroj de STARTO estas jenaj:

por n-ro 1/81	..... ĝis	31.1.1981	ĝi aperos	dum la marto
por n-ro 2/81	..... ĝis	28.3.1981	ĝi aperos	fine de majo
por n-ro 3/81	..... ĝis	23.5.1981	ĝi aperos	fine de julio
por n-ro 4/81	..... ĝis	13.7.1981	ĝi aperos	fine de septembro
por n-ro 5/81	..... ĝis	19.9.1981	ĝi aperos	dum la novembro
por n-ro 6/81	..... ĝis	7.11.1981	ĝi aperos	fine de decembro



Místní skupina T ř e b í ě vydala k výročí narození třebíčského rodáka a známého spoluzakladatele KSC Bohumíra Šmerala útlou, ale hezkou brožurku. Zájemci se mohou obrátit přímo na EK Třebíč /674 Ol/p.schr.72 s prosbou o zaslání. Jde rovněž o jeden z příspěvků naší organizace k 60.výročí vzniku KSC v příštím roce.

V celém světě ceny stoupají. Pouze náš svaz např.snižuje trvale ceny odznaků. Za poslední tři roky dochází ke slevě i přes 50 %. Umožňují to především velké serie. Např. odznak IFEK /Internacia Fiskaptista Esperanto-Klubo/ je nyní vydán v 10ti druhích v krásných barevných kombinacích, takže tvoří uzavřený celek, pro sběratele zvláště atraktivní. Původní cena byla 11 Kčs za kus, nyní pouze 5 Kčs za kus. Neváhejte a objednávejte včas, vánoční svátky jsou tu! A odznaky jsou velmi vhodným dárkem všem vašim přátelům doma i v zahraničí - i neesperantským.

Příští rok je rokem příprav našeho svazu na náš IV.sjezd, který uskutečníme v I.čtvrtletí 1982. Chtěli bychom se stát organizací s počtem členů nad 3000 osob. Pomůžete i vy? Jak? Včasným obnovením svého členství a získáním nových členů. Pokud ještě nejste členem některé naší místí skupiny, obraťte se přímo na sekretariát. Členové v kategoriích D nebo E uvažujte o úpravě svého členství na kategorii A, i to je vydatná pomoc svazu!

Konata romano de B. Prus "FARAONO" prilaborita kiel la Bildrakonto /aŭtoroj T.C.Horvat-tekstoj, A.Fazekas-bildoj/ estas sendube kuraga ago, kvankam ne la unua tiuence. Similmaniere Hungara Esp.Asocio jam eldonis la romanojn "La filoj de ŝtonkora homo" kaj "Steloj de Eger".

La kajera eldono signifas malaltigon de la prezo kaj mallongaj tekstoj altiras nome tiujn, kiuj la lingvon nur lernas. Kaj tio ja estas simpatia. Kvankam ekestos diversaj opinioj pri la celtrafo de tiu ĉi edicio kaj certe iuj malakceptos tian prilaboron de klasika romano, mi tiun ĉi paŝon sincere bonvenigas kaj rekomendas speciale al tiuj, por kiuj ĝi estas destinita.

Kolora koverto, formato A5, prezo Kčs 13,-.

Zd.Křimský

---

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 00 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Za obsah tohoto čísla odpovídá PhDr. Jaromír Jermář CSc a Zdenko Křimský. Grafická úprava M. Lobačta. Fotografie Z. Křimský a archiv. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven Praha. Předáno do tisku 17.11.1980. Dohledací místa Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č.j. P/1 - 1267 se dne 6. dubna 1979.

# KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbot-  
avolo - duparta pordego - deklina  
tegmento - sen planko - facila mu-  
ntado au sur submuro au sur ebe-  
na tereno


Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs  
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs  
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs  
Largo 3030 mm alto 2450 mm estas  
egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malon-  
ga tempo 1-2 semajnoj liveras

## INKLEMO

PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adre-  
so de komerca fako: INKLEMO PRA-  
HA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA  
9, Spojovací 11, autelefonu al n-ro 83 09 49.  
Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la  
kooperativo. Transporton ni povas certigi. Re-  
mizojn ni liveras nur al privatuloj.



Sandrik, n.p. estas la monopola produktanto de aer-filtriloj por eksplod-motoroj kaj kompresoroj de malgranda kaj meza laborefekto (escepte de tiuj por motorcikloj, lokomotivoj kaj ŝipoj). La produktado de la aerfiltriloj ekrealiĝis en nia entrepreno en la jaroj 1963-64 post ĝia elpartigo de la antaŭa produktanto de filtriloj "Autobrzdy, n.p." Kralupy n. Vlt. En 1974 ni aĉetis la licencon por produktado de oleaj aer-filtriloj de la firmao IFE FILTERBAU - Weidhofen, Aŭstrio. Per la aĉeto de la licenco ŝanĝiĝis la tuta sortimento de la oleaj aer-filtriloj.



Nuntempe ni produktas jenajn tipojn:

- oleajn filtrilojn,
- la tiparon S (personaj aŭtomobiloj),
- la tiparon SPP,
- la tiparon VTCP

Sandrik, Dolné Hamre n.p., per sia produkt-kapablo ebligas plene kontentigi la postulojn de la aŭtomobila industrio.